

VITTORIO MESSORI PRI ANTAŬNELONGE ELDONITA BIOGRAFIO DE ALI AĜCA

Dislime de januaro kaj februaro aperis en italaj librovendejoj biografio de Ali Aĝca „Ili promesis al mi edenon: Mia vivo kaj vero pri atenco kontraŭ la papo“, en kiu estinta „griza lupo“ diras, ke kaŝintencanto kaj mendanto de la provo murdi la papon la 13-an de majo 1981 sur la placo antaŭ Baziliko de Sankta Petro en Romo estis Ayatollah Chomeini. Tiun ĉi eksplikon Vatikano rezolute negis per buŝo de sia oficiala proparolanto P. Federiko Lombardi, kiu prezentas tre kredindajn atestojn por klarigi, ke tio estas mensogoj.

Paolo Rodari: „Vittorio Messori, vi la plej estimata itala katolika verkisto kun aro da „bestseleroj“ kaj demandanto de la papoj: Pri kio ĉi tie temas? Ĉu pri plua, intertempe lasta eldiraĵo post jaroj de mistifikado de la komunikaj rimedoj?“

Vittorio Messori: „Mi ne opinias, ke estas eble diri ion tian.“

Rodari: „En kiu senco?“

Messori: „En fluo de supozoj kaj provoj pri ekspliko de atenco la religia spuro, kiun ĝis nun neniu adekvate sekvis, kiel ĝi tion meritis, estas miaopinie ununura, kiun estas necese serioze trakti. Estas certa, ke ne ĉio, kion hodiaŭ Ali Aĝca diras, estas vero. Sed la religia spuro restas hodiaŭ la plej ver-simila.“

Rodari: „Ĉu vi parolas pri ŝijaista islam-o?“

Messori: „Certe. Sed ankaŭ pri Fatimo. La portugala mariana sanktejo estas io sank-teca ankaŭ por ĉiu muzulmano. Ĝi portas nomon de populara filino de Mohamedo, kiu edziniĝis al Ali kaj havigis al li idojn, je kiuj sin referencas precipe ŝijaista islam-o, dis-vastigita ne hazarde ĝuste en Irano. Oni eĉ ne povas subtaksi, ke la plej grava apero de la Patrino de Dio, la Virgulino Maria, okazis en la 20-a jarcento sur ununura loko en Okcidento, kiu portas nomon de tiu virino, kiu estas tiel kara al muzulmanoj, kaj oku-pas ĉe ili rolon de Maria. Interalie korano alportas pri Maria ankaŭ esprimojn de la plej alta laŭdo kaj pia estimo. Konsiderinde tion, ludas ĉi tie iu reciproka kuniĝo kaj ŝanĝo de roloj inter du virinoj la plej honorataj en muzulmana mondo: inter Patrino de Jesuo

kaj filino de Mohamedo. De tie eliras longa vico de postuloj metitaj kaj eldevigataj fare de muzulmanoj, kiujn Okcidento ĉiam dis-treme preteratentis. Sufiĉus nur atenteme observi kaj pripensi tion, kion la irana tele-vido ĉiutage elsendas, por kompreni tion.“

Rodari: „Kion?“

Messori: „Ĉiumonate la irana televido elsendas programojn fortimige publikigante „ŝtelojn“ krimfaritajn je Fatimo. Por ŝijaistaj muzulmanoj dominantaj en Irano al tri paŝ-tistetoj en Fatimo ne aperis la Virgulino Maria, Patrino de Dio, sed ĝuste tiu Fatimo, filino de profeto Mohamedo. Krom tio, se ni aŭskultos responsajn reprezentantojn de la fatima sanktejo, ni ekscios, ke inter la pil-grimuloj ĉiam pli kreskas nombro da mu-zulmanoj, kio vere igas kompreni, kiel grava loko por tiu mondparto estas Fatimo.“

Rodari: „Kiel tio ĉi ĉio rilatas la papon Johanon Paŭlon la Duan?“

Messori: „Por ŝijaista islam-o, kaj por neniu tio estas sekreto, estas simple neto-lerlebla, ke Fatimo apartenas al katolikoj. Tiusence la famkonata paraleleco (13-a de majo) inter atenco en Romo kaj apero de la Virgulino Maria en Portugalio povus validi kiel signo. Pagu per sia vivo pro farita sakri-legio estro de tiu eklezio, kiu uzurpis tion, kion Alah-o volis por »veraj kredantoj«, do por veraj mohamedanoj. El tiu ĉi vidpunkto ne ŝajnas ligiteco inter turko kaj Dipatrino hazarda...“

Rodari: „Johano Paŭlo la Dua ĉiam ku-nigadis travivitan atencon kun mistero de Fatimo. En la jaro 2000 li publikigis la trian parton de la sekreto, en kiu temis pri la aten-



Ali Agca

co kontraŭ roma pontifiko kaj malkaŝis, ke tiu estis ĝuste li mem. Sed ĉu li fakte opiniis pri la ŝijaista islamo?

Messori: „Malfacile estas respondi. Certa estas nur la fakto: La politika spuro neniam Vatikanon profunde konvinkigis. Kaj konvinkigis eĉ ne eksterlandan sekretan servon de Orienta Germanio. Estas konate, ke eĉ Markus Wolf, estro de la germana sekreta servo, kiu eluzadis servojn en Vatikanon senditan benediktanon Eugen Brammertz, por akiri iujn sekretajn informojn, ne opiniis kiel versimilan politikan spuron, do ke la atenco estus planita fare de ŝtatoj de orienta Eŭropo. Do kiam li estis demandita, ĉu Stasi (orientgermana sekreta servo) estis iamaniere enplektita, li respondis: »Ne, tio ne estis nia laboro.« Eble ne eĉ pro tio, ke tio estus grandega bumerango. Cetere estas bone konataj ligiloj kunligantaj Alli Aĝca-n kun rondoj de islama fundamentismo. El ĉi tiuj ĉiuj motivoj estas naturte logika kaj konsekvenca la opinio pri vereco de tiu ĉi hipotezo.“ ■

Paolo Rodari
(*Aperinta en Il Giornale 02.02.2013*)